

Numero 39

FAMILIA ESPERANTO n-ro 06 (1/2002)



FAMILIA ESPERANTO

**NEREGULA CIRKULAĴO
DE RONDO FAMILIA**



ELDONAS: RONDO FAMILIA DE UEA

EDITORA ANGULO

Kanaĵ legantoj,

Per la buketo de tulipoj mi sendas al vi printempan saluton el Nederlando. Ekspedinte la cirkulaĵon ankaŭ mi revojaĝos al Slovakio, do daŭre validas mia ticia adreso. Sed ĉi-numero "naskiĝis" en Roterdamo; la helpo de sperta komputisto kaj la bonaj teknikaj rimedoj certe rimarkeblas sur ĝi. Kial ne denove kalara kovrito? - Certe vi demandas. Bedaŭrinde, la monkdandiĉoj de Rondo Familia ne permesas tion. Necesas iam enspezi...

Kaĵ kie estis vi dume? Kion vi spertis, kion vidis? Mi volonte akceptos viajn raportojn, fotojn... Se vi vizitas iun interesan E-aranĝon, bonvolu transdoni viajn rimarkojn ankaŭ al ni. Mi atendas viajn leterojn...

Kun saluto,

Katarina



LA TRI GENERACIOJ DE LA ESPERANTO-SOCIO

PRI LA DEMOGRAFIA STRUKTURO DE LA ESPERANTO-SOCIO, PRI LA DU BREĈOJ, KIUJ ROMPAS LA GENERACIAN KONTINUECON KAJ PRI LA ROLO DE INTERNACIAJ FAMILIAJ RENKONTIĜOJ /APARTE PRI LA INTERNACIA INFANA KONGRESETO/ SKRIBAS AMRI URANDEL /ISRAELO/, LA GUIDANTO DE RONDO FAMILIA DE UEA.

La demografia konsisto de la Esperanto-socio ne estas simila al tiu de tipa socio. Estas konate, ke en la E-movado sufiĉe mankas la mezaĝa generacio, pli - malpli inter la aĝoj de 30 kaj 55 jaroj. La kialo estas simpla: dum la vivetapo de konstruo de familio kaj profesia kariero personoj normale ne havas la tempon kaj la energion necesan por lerni novan lingvon kaj okupiĝi pri ne praktika hobbio. Tiu manko estas foje nomata "la mezaĝa-generacia breĉo". Personoj ne jam konantaj Esperanton en tiu fazo de sia vivo kutime ne alprenas novajn aktivecojn kaj ŝatokupojn aldone al tiuj, kiujn ili jam havas aŭ konas. Personoj, kiuj aktivis kaj okupiĝis pri Esperanto kiel gejunuloj, ofte ne trovas tempon daŭrigi la agadon aŭ plue okupiĝi pri Esperanto. Ekzistas du esceptoj: tiuj, kiuj profesie okupiĝas pri Esperanto kaj familioj, ĉe kiuj Esperanto estas la komuniko-lingvo /plej ofte internaciaj paroj/ aŭ familioj, en kiuj unu el la gepatroj parolas Esperanton al la infanoj. La nombro de tiuj E-familioj kaj profesiaj esperantistoj tamen estas relative malgranda.

La dua aĝogrupa, en kiu ekzistas intensa agado kaj sufiĉe multaj E-parolantoj, estas la junulara-adoleska. En la junulara medio oni ofte alprenas novajn ideojn kaj ŝatokupojn. Esperanto kiel internacia komunikilo - rimedo por internacie korespondi kaj vojaĝi - ofte logas gejunulojn. Ili aliĝas al loka junulara grupo aŭ partoprenas internacian junularan renkontiĝon, kiel la IS /Internacia Seminario de Germana E-Junularo/, IJF /Internacia Junulara Festivalo de Itala E-Junularo/, kaj la IJK /Internacia Junulara Kongreso de TEJO/.

Tria aĝogrupa en kiu troviĝas E-parolantoj estas la infanaĝo. Infanoj eklernas Esperanton ĉu denaske aŭ en juna aĝo en la familia kadro. Tiu lingva akiro povas resti pasiva, flanka al la nacilingvo uzata en la ĉirkaŭa medio, aŭ fariĝi aktiva, aparte se la infano havas kontakton kun aliaj samaĝaj infanoj, konantaj Esperanton. Tia kontakto plej ofte okazas dum familiaj E-aranĝoj kiel REF /Renkontiĝo de E-Familioj/, PSI /Paska Semajno Internacia/, IF /Internacia Festivalo; vd. Esperanto, februaro 2002, p.42/ kaj similaj, aŭ renkontiĝoj kun aparta porinfana programo aŭ subaranĝo, kiel la IIK /Internacia Infana Kongreseto/, apud la UK/, al kiu la infano vojaĝas kun la gepatroj. Tiuj renkontiĝoj donas al la partoprenantoj socian sperton de amika rondo, la tiel nomata "verda familio". La familiaj aranĝoj provizas taŭgan Esperantan medion ankaŭ por la junaj infanoj, ĉu kun la gepatroj /kiel ekzemple en REF/ aŭ aparte kun gvidantoj, kiel en la IIK /ĉi-jare okazonta en Fortaleza, Brazilo/.

Jam de jaroj dum naciaj kongresoj okazas en Brazilo infanaj kongresetoj, simile grandaj kiel la internaciaj. Oni do povas kalkuli je partopreno de brazilaj infanoj kaj la haveblo de spertaj gvidantoj. Ĝis nun la infanaj kongresetoj estis preskaŭ ekskluzive eŭropaj. La kongreseto en Brazilo markos do unikan ŝancon kaj precedencon.

Vi povas helpi al Rondo Familia plenumi siajn celojn per simbola abono al la bulteno Familia Esperanto /10 eŭroj ĉe UEA/ aŭ per kontribuoj al la fondaĵo idoj-p.

LINGVA ANGULO

MEMORHELPILOJ

Mia instruisto pri geografio en baza lernejo tre ŝatis enkapigi al ni versetojn, kiuj enhavas lernendajn donitaĵojn. En la germana oni nomas tiajn rimajojn azenaj pontoj. Ili encerbiga fiko estas enorma; ekzemple, pro unu el ili mi memoras ĝis nun la sep nomojn de riveretoj, kiuj en Germanio enfluas en Danubon /eĉ de kiu flanko ili enfluas/.

Estante jam adolto mi konstatis, ke multaj homoj, kiuj tre bone scipovas fremdan lingvon - ĉu Esperanton, ĉu iun nacian - ofte ankoraŭ ne konas en tiu lingvo multajn nomojn de plantoj kaj bestoj /certe kun escepto de tiuj, kiuj speciale okupiĝas pri biologio, naturprotektado k.s./.

Pro tio mi ekhavis la ideon krei en Esperanto similajn rimitajn memorhelpilojn. Jen du el ili.

KONIFEROJ /pinglarboj/

Se dumvintre sur branĉoj la pingloj postrestas - abio, piceo aŭ pino ĝi estas.

Se aŭtune la vento ĝin ekas malvesti - sendube lariko, nur ĝi povas esti.

GRENO

Kiel nomiĝas la plej grava greno? Tritiko, sekalo, hordeo, aveno.

Mi intencas elpensi pluajn tiajn "azenajn pontetojn" por iam aperigi ilin en libreto / laŭeble kun desegnaĵoj aŭ fotoj de koncernaj objektoj/. Volonte mi kunlaboros en ĉi tiu afero kun aliaj samideanoj.

Matthias Behlert
Nehringstrasse 4
DE-14059 Berlin, Germanio

El: Litova stelo 1/2002


<http://galerio.org>



Iliana Borisova

Joost Witteven nur antaŭ unu jaro kreis paĝaron enhavantan jam ĉirkaŭ 250 belajn fotojn kaj bazajn informojn pri la portretita persono - esperantisto.

Se vi scivolas pri ĝi kaj se vi ŝatus eniri la menciitan galerion, iru al la supra adreso.



Joost Witteven

Desegnata poemo

verkis kaj desegnis: Esperantina Mirska



Estas bulko kaj la pano, ora fiŝo kaj banano,



ronda cirklo, longa streko, eta du, granda deko,



jen la ŝnuro, blanka velo, la muŝfungo kaj ombrelo



estas ĉapo kaj la ŝuo, larĝa pordo, ŝlosilruo



estas pruno, ruĝa pomo, alta arbo, eta domo



jen okulo, bona koro, la folio kaj la floro



dolĉa kuko, griza muso, nigra rado, blua buso



estas birdo kaj telero, bunta plumo kaj letero



triangulo apud kubo, duonluno kaj la nubo



jen botelo, ene vino, la kaliko kaj jam

FINO!

LIBROBRETO

Glaciflor' en mia man'

La Esperanta versio de la hungarlingvaj libroj de Sándor Beke.

Tradukis: Tibor Papp.

Eldonis: Debrecena E-Societo en 2000.

A5-formato, 58 paĝoj, nigra-blankaj ilustraĵoj.

Ni proponas ĝin por 4 - 7 - jaruloj.

Aĉeteblas /en la libroservo de UEA/ po 4,2 eŭroj.



Printempo

En la kamp' primol' elkreskis,

Neĝ' degelis jam,

Jen bukedo, mia kara,

Bona por ornam'!

Kaj violo kaj galanto,

Aŭdu, mia kor'.

En printempo turdo trilas,

Kantas oriol'.

Silka bluo en ĉielo,

Krevas jam burĝon'

Neĝ'-insule danc' hirunda,

'En amuz-sezon'.

Eĉ al danco, eĉ al balo,

Diras la ursid',

Kapreoloj kaj leporoj

'En amuz-agit'.

Jen sikulo en kamparo,

Laŭtas kanto-son',

Flug' hirunda, kvazaŭ sonĝo,

Vivo estas bon'!

Pipi Ŝtrumpolonga de Astrid Lindgren

Tradukis Sven Alexandersson

Prezo: 9,30 eŭroj /en la libroservo de UEA/

Fratoj Leonkoro de Astrid Lindgren

Tradukis Kerstin Rohdin

Prezo: 7,50 eŭroj


Emilo de Smolando de Astrid Lindgren

Tradukis: Kerstin Rohdin kaj Harold Brown

Prezo: 6,60 eŭroj

Astrid Lindgren kaj ŝiaj verkoj de Kerstin Rohdin

Prezo: 4,80 eŭroj.



Malgajan aktualecon al la libroj de Astrid Lindgren donas sia forpaso (1907 - 2002).

Bele rememoras pri la verkistino Kerstin Rohdin (Svedio): "...Mi kelkfoje renkontis Astrid Lindgren. Ŝi ĉiam interesiĝis pri Esperanto kaj ofte diris al mi ke ŝi deziris esti lerninta Esperanton kiam ŝi estis juna. Tio povintus okazi, ĉar antaŭ sesdek-sepdek jaroj Olle Olsson (Lund) estis energia Esperanto-instruisto en Vimmerby.

Astrid Lindgren kaj la ilustristino Non Wikland donis al mi la rajton uzi la tekstojn kaj la bildojn senpage. Tio ekonomie obligis la esperantigon de la libroj."

"...En la muzeo Astrid Lindgrens Varld en Vimmerby estas ekspoziciataj grandformate la Esperantaĵ kovertoj de la Esperanto-tradukoj."

El: KUMPIRO - januaro 2002

LA 18-a INTERNACIA FESTIVALO

27.12.2001 - 3.1.2002, MAGDEBURG, GERMANIO

La ĝis nun lasta, 18-a IF, okazis unuafoje en nova federacia lando Saksio-Anhaltio. Ĝi estis bona elekto. Ni povis rimarki agrablajn diferencojn. Afabla akcepto de la direktoro, feste dekoraciita enirhalo ktp. Partoprenis ĉirkaŭ 200 gesamideanoj, inter kiuj pluraj novuloj.

Ni loĝis ne malproksime de la urbocentro. Dum plurfojaj urbaj promenoj, gviditaj de spertaj magdeburganoj, ni konatiĝis kun tiu tre bela urbo kaj ĝiaj vidindaĵoj.

Post la vespermanĝo kaj bonvenigaj vortoj de la **organizanto Hans-Dieter Platz** - la motoro de IF - okazis interkona vespero, kiun per spritaĵoj animis la konata magiisto Trixini. Mikaelo Bronŝtejn gitaris kaj kantigis la ĉeestantojn. Ekestis agrabla etoso.

La programo, kiel kutime, tre variis kaj abundis. La kadra temo "UNU MONDO - KVIN KONTINENTOJ" estis bone plenumita. El ĉiuj kontinentoj ni ĝuis ion admirindan.

Travivaĵoj el Afriko, lumbildoj el Aŭstralio, Venezuelo kaj Brazilo, el Israelo kaj Groenlando. El Azio ni gustumis uzbekan manĝon "manti". Arto estis prezentita el fora Dagestano. Ne mankis poemoj, kantoj eĉ religiaj, danckursoj, origami, Jumeiho terapio kaj gimnastiko, kvizo, konkurso por legemuloj, bakkurso, trezorserĉado, paroliga kurso, ktp.

Fakaj preleĝoj estis prezentitaj fare de kompetentaj prelegantoj. Ekestis viglaj diskutoj kaj interŝanĝoj de opinioj, kiuj pliriĉigis kaj kompletigis la koncernajn temojn.

Ĉar okazis transiro al eŭropa monunuo "eŭro", oni interŝanĝis, admiris kaj komparis diverslandajn monerojn. Cirkulis germanaj, francaj, belgaj, nederlandaj kaj aŭstraj eŭroj.

La granda magiisto Trixini ĝojigis infanojn. Ne mankis trukfotisto, kiu multobligis iujn ĉeestantojn en amuzaj pozicioj. Dum la folkloro dancvespero aŭdiĝis diversaj popolkantoj. Ne mankis surprizoj de la ĉef-organizanto, nia kara HDP. Ĉi-foje ni ricevis esperantan IF-kantareton. Novulojn li bonvenigis per glaso da ŝaŭmvino. En restoracio, post la ekskurso tagmanĝo, estis al la ĉeestantoj ofertita terpoma likvoro.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la urbo Lutherstadt Wittenberg, konata pro la reformisto Martin Luther. Ni trarigardis preĝejon, bonguste tagmanĝis, vizitis presejon kaj revene ni admiris la ekstravagance pentritan fasadon de renovigita gimnazio.

La silvestra bufedo estis bele aranĝita kaj dekoraciita. Ĝia enhavo jam unuavide allogis. Dum la balo ni agrable dancis kaj babilis. Novjaraj kisoj, ridetoj, ĉirkaŭbrakadoj, tintadoj kaj reciprokaj bondeziroj abundis kaj ŝaŭmvino fluis freŝigante niajn gorĝojn.

Dum vesperaj programoj ni estis regalitaj per magiumado de Trixini, koncerto de profesia kantistino Elena Puĥova, gitar-koncerto kun poemoj de Mikaelo Bronŝtejn kaj per diversaj interesaj humuraĵoj. Post ĉiu prezento sekvis la kutima "knajpumado" ĝis malfruaj horoj.

Dum la lasta, internacia vespero, ni spektis ĵongladon, kantadon, amuzajojn, skeĉojn.

Ankaŭ la plilongiga tago estis tre interesa. Dum la preleĝo pri Puŝkin ni gustumis "puŝkin likvoron". Projekciado de lumbildoj el Groenlando kaj ekzotika Venezuelo vekis intereson kaj admiron. Tre festeca estis la vespermanĝo "Raclette-fromaĝo" kun franca ruĝa vino kaj ĉeĥaj kuketoj. La kantoj de Mikaelo Bronŝtejn kaj tiuj de la kantareto gajigis la bonan estoson ĝis malfrua nokto. Ni ĉiuj travivis eksterordinare belan vesperon.

Dum Internacia Festivalo oni ĉiam konatiĝas kun novaj amikoj kaj kune ĝuas agrablan etoson. IF estas tre interesa, lerniga, kontaktiga, amuza kaj tamen serioza aranĝo.

Ne manku en la venonta 19-A IF! Vi sentos vin reĝeĉe, ĉar unuafoje ni festos en la iama akvokastelo Borken, kiu troviĝas en okcidenta Vestfalio proksime al la nederlanda limo. Ne hezitu, jam 80 partoprenantoj aliĝis surloke. Ĉu ankaŭ vi?

Liba Gabalda

KIEL PAROLI ESPERANTON KUN SIA TRIJARA FILINO

"... mi estis akceptita en lia hejmo. Ekde la sojlo, li alparolis min Esperante, kaj mi baldaŭ konstatis, ke nur tiun lingvon oni uzadas ĉe li. Tio efikis iom strange sur min ... jen ŝajnis al mi, ke mi eniras en alian landon, kie Esperanto estas ne plu simpla helpilingvo, sed ja la ĉefa kaj vera esprimilo. Imitinda ekzemplo ... al Lanti mi ŝuldas la senton pri ties (de Esperanto – P.F.) vivanteco."

G. Varingjen (Waringhien)

(el la antaŭparolo al la libro "Leteroj de E.Lanti", SAT, 1940)

19.08.2001 mia filino iĝis trijara kaj mi ekparolis al ŝi en E-o. La paŝo estis tre malfacila por mi kaj mi prepariĝis dum tri jaroj.

Inter miaj amikoj kaj konatoj mi malofte spertas enfamilian E-parolon. Mi povas rememori nur la familiojn de Ivan Naumov kaj Svetlana Kotelnikova. Kaj nur la ekzemplo de Naumov-familio estis por mi sufiĉe konata. En aliaj (konataj al mi) E-familioj E-o preskaŭ ne sonas. Sed Ivan Naumov en la familia rondo ĉiam strebas paroli kun la infanoj en E-o. Kaj multaj E-parolantaj gastoj ankaŭ provas siajn fortojn en tiu afero. Vere, ne multaj eltenas, ĉar paroli al plenaĝa persono kaj al infano estas tre malsamaj aferoj. Certe la infanoj parolas ruse pli bone ol Esperante, sed se estas bezono ili ne malbone konversacias kun ne rus-parolantaj E-istoj.

Ve, mi pro diversaj kaŭzoj ne povis paroli kun mia filino en E-o ekde ŝia naskiĝo. Verŝajne mi ne havis kuraĝon. Sed laŭ interkonsento kun mia edzino (ŝi parolas itale multe pli bone ol Esperante) mi decidis lanĉi la eksperimenton. Iu fundamento jam estis, ĉar unu el la plej ŝatataj animaciaj filmoj de mia filino estas "Mazi en Gondolando". Jam printempe ŝi ofte diris: "Я granda", kiam volis substreki, ke ŝi jam ne estas malgranda infano. Kiam venis ŝia tria naskiĝtago, mi klarigis al ŝi, ke ni plu parolos samkiel Mazi. Kaj ĉio ekis.

La komenco estis certe tre malfacila: mia propra filino min ne komprenas; mi ne povas preparoli kun ŝi eventojn kiujn necesas nepre preparoli k.t.p. Estis momentoj kiam mi min demandis: "Ĉu estas bezonata la turnento?". Sed mi streĉis ĉiujn miajn fortojn kaj eltenis la komencajn problemojn. Kaj poimete mi komencis rimarki, ke mia filino ĉion komprenas kaj eĉ provas uzi E-vortojn en sia parolo. "Panjo", "ĝis", "atente", "ŝarko" kaj aliaj vortoj jam estas uzataj de ŝi. Certe ŝi ne babilas Esperante, sed komprenas ĝin pli bone ol pluraj konataj e-stoj kiuj estas multe pli aĝaj kaj lernas ĝin dum jaroj. Dume mi parolas al ŝi Esperante ne dum la tuta tempo: vespere antaŭdormi mi ruslingve rakontas fabelojn kaj nokte, se ŝi vekiga, mi parolas al ŝi ruse. Tamen verŝajne ekde la Novjara festo mi provos plene rezigni la rusan parolante al ŝi.

Kiujn problemojn mi renkontis kaj kiel mi ilin solvis. Problemo numero unu: mia infano min ne komprenas. La problemo estas verŝajne la plej grava. Estas nur sola ebleco ĝin solvi: ne rapidi kaj klarigi per gestoj aŭ aĵoj kion mi volas. Plej verŝajne la unuan fojon la infano min ne komprenos, sed estos dua, tria, deka fojo hodiaŭ, morgaŭ, postmorgaŭ kaj finfine ĉio solviĝos. Tamen la problemo estos ĉiam, ĉar mi uzos pli multe da nekonzataj vortoj. Certe estas facile, kiam mi petas doni al mi panon aŭ surmeti pantoflojn – mi montras per gestoj kion mi volas. Tute malfacile estas klarigi ion ne tiom aĵecan: lavi la manojn aŭ iri hejmen. Sed post iom da ripetoj la infano ĉion komprenas. Por mi estis vera ĝojo ekaŭdi rusajn respondojn al iuj E-postuloj. Ekz.: "Iru hejmen – я не хочу домой"; "Necesas lavi la manojn – у меня чистые руки" k.t.p.

Problemo numero du: rilato de aliaj, ofte fremdaj personoj al E-parolado. Tiun problemon eblas dividi je tri partoj: familianoj, fremduloj, infanoj. En mia okazo familianoj estas la patrino kaj la avinoj. La patrino, kiu ne bone posedas E-on, komencas pli kaj pli bone kompreni ĝin. Ni eĉ iomete konkuras, kiu pli bone posedas la lingvon: ĉu mi kun la filino E-on, ĉu la patrino – la italan. Dume ni gajnas. Mi timis iujn problemojn flanke de la avinoj, sed la avino jam serĉas "пантофлю" de la nepino. Alia grava problemo estas rilato al nia malklara komunikado flanke de fremda publiko. Kiam ni ludas sur infankorteto, veturas en buso, vizitas kuraciston kaj en similaj cirkonstancoj nin ĉirkaŭas homoj kiuj ne ĉiam bone rilatas al nekompreneblaj paroloj. Foj-foje estis strangaj demandoj: "Это вы на молдавском

(украинском, английском, испанском, каком) говорите?” Certe mi klarigas, ke ni uzas E-on. Feliĉe, dume ĉiuj bone rilatas al niaj interparoloj. En la infanĝardeno kaj la porinfana lernejo oni tre bone rilatas al niaj strangajoj, eĉ rememoras, ke iam iu jam parolis kun sia infano en la angla lingvo. Sed, verdire, mi ofte hontas paroli ne ruse, kaj tiam mi al mi diras: “Kial uzbekoj, kartveloj kaj aliaj senprobleme parolas sed mi ne povas tion fari?”. La sekva problemo estas kontaktoj de mia filino kun samaĝuloj. Por ŝi estis iomete strange, kiam neniu komprenis ŝian frazon “Я granda!”. Sed nun por ŝi estas klare, ke plejmulto el la ĉirkaŭuloj ne komprenas tion kion komprenas kaj parolas la patro.

Sekvan problemon malfacilas solvi per simpla streĉo de volo. Temas pri manko de porinfana E-literaturo. Certe mi scias, ke ĝenerale la literaturo ekzistas kaj mi eĉ havas iom da ĉinaj infanaj libroj, sed... Mi havas proksimume cent librojn taŭgajn por 3-jara knabino en la rusa lingvo kaj nur kvin en E-o. Certe mi povas (kaj faros tion) traduki iujn librojn kaj provi legi ilin en E-o, sed tio estas neserioza. Nun mi serĉas porinfanajn E-librojn, ĵurnalojn k.t.p. Ĉu iu el legantoj povas helpi min?

Ankaŭ ekzistas problemoj kiun en la antaŭa numero de REGo menciis mia amiko Sergeo Beznosko. Tio estas problemoj pri ĉiutage parolata vortaro. Verdire mi imagis malfacilaĵojn, kiujn mi renkontus, kaj eĉ planis iujn rimedojn por solvi ilin, sed la problemoj solviĝas multe pli facile ol mi atendis. Ekz. mi dume ne scias vortojn поганка, подосиновик, каляка-маляка (interalie sufiĉe grava nocio por trijara infano), sed mi jam scias 8 (ok!) nomojn de kaĉoj kaj speciale kompilis bleko-liston por diversaj bestoj. La problemojn mi solvas kaj per helpo de Rusa-Esperanta vortaro de Bokarev kaj legante E-librojn. Jen la vorton “pastorulilo” mi trovis en scienc-populara libro. Krom tio mi trafolumas porinfanajn librojn kaj subskribas pentraĵojn, plejparte per bestonomoj.

Finante la artikolon mi povas konkludi, ke al mi tre plaĉas paroli en E-o al mia filino kaj mi malgraŭ diversaj obstakloj planas daŭrigi la eksperimenton.


P.Fiŝo (Koroljov)

El: RUSIA ESPERANTO-GAZETO / REGo, novembro 2001



ĈU TIEL NASKIĜAS VORTOJ?

Trevor Steele



Mia filo David estas denaske dulingva: kun la patrino li ĉiam parolas angle, kun mi ĉiam esperante. Neniu povas priskribi la ĝojon observi la evoluon de la propra infano, kaj la lingva kresko estas vere mirakla. Tamen ne estas ĉiam facile paroli esperante en alilingva medio, ĉar al nia lingvo ankoraŭ mankas miloj da vortoj de ĉiutagaj objektoj. Kiom da aferoj ni nomas *kovrilo*, por kiuj la naciaj lingvoj, evoluintaj dum jarcentoj, havas apartajn vortojn?

Kaj infanetoj povas esti lingve tre postulemaj: ili ne ĉiam kontentas pri tia nespecifa vorto, kia *kovrilo*. Ili komencas regi sian etan mondon per tio, ke ili donas nomojn al la diversaj aĵoj renkontataj.

En Aŭstralio la plej populara somerferia piedvesto estas nomata angle *thong*. Ĝi konsistas nur el plandumo kaj V-forma rimenparo: la pinto de la V ligiĝas al la plandumo inter la du plej grandaj piedfingroj. Iun tagon, dum ni ripozis sur plaĝo, David fingromontris al *thong* kaj demandis, “Paĉjo, kio estas tio?”

Mi ne havis pretan vorton, do mi iom blufis, “Tio? Aĥ, ĝi estas sandalo.”

“Ne, Paĉjo, ĝi ne estas *sandalo*. Tio estas sandalo.” Kaj li indikis piedveston de apuda virino. Kaj li pravus. El lia vidpunkto la multrimena sandalo estis tute alia objekto.

Mi deziris, ke estu ie apude bildvortaro, kiu montrus ĝuste tian nesandalon. Sed E-bildvortaroj ne ofte aperas spontane sur aŭstraliaj plaĝoj. Do necesis pensi pli ol mi volis dum varma feritago.

“Nu, en Nov-Zelando la homoj diras *jandal*,” mi diris. “Ĉu *ĝandalo*, aŭ eble *ĵandalo*?”

“Ne, Paĉjo, tio estas nur en Nov-Zelando.” Evidente mia filo tre frue lernis la lecionon, ke nenio bona venas el tiu transtasmata landeto. Sed li volis mem proponi. Li sciis, ke la angla *th*, kiu postulas, ke oni elbuŝigu la langon, ne estas akceptebla en Esperanto, sed li serĉis varianton. “Paĉjo, ĉu ni povas diri *fongo*?”

“Ne,” mi respondis, “la esperantistoj en Nov-Zelando ne komprenus.” Li akceptis la logikon de mia aserto. Ni ambaŭ grimace rigardis la blujajn ondojn de la Pacifika Oceano ŝaŭme blankiĝi kaj rompiĝi sur la malprofundaj sablodunoj. Sed tiun tagon ni ne solvis la problemon pri *thong*.

Kelkajn tagojn poste mi estis en biblioteko kaj serĉis ion tute alian, kiam *eureka!* Mi vidis desegnaĵon de japana kostumo: la homo portis piedveston absolute similan al la aŭstralia *thong*. Ĝi havis la nomon *zorio*. Alveninte hejme, mi iris al mia fileto kaj klarigis mian trovaĵon. Mi uzis lian karesnomon, “Krabo, mi proponas, ke ni diru *zorio*.”

La eta vizaĝo tre serioziĝis. Li ripetis la vorton kaj opiniis, ke ĝi ne sonas esperante.

“Nu bone,” mi ŝultrumis. “Mi provis. Ĉu vi havas pli bonan vorton?”

Refoja pripensado. Fine li diris, “Nu bone, Paĉjo. Ni diru *zorio*.” Kaj tiel estas inter ni du ĝis hodiaŭ, preskaŭ du jardekojn poste.

Antaŭ kelkaj jaroj aperis la bone farita vortaro de Ralph Harry kaj Brian Fox, kiu tradukas en Esperanton specife aŭstraliajn kaj novzelandajn vortojn (la angla havas siajn dialektojn). En ĝi mi trovis, ke *thong* estas *zorio*. Kia bona elekto! Mi skribis al Brian Fox por laŭdi lin, supozante, ke ankaŭ li vidis bildon de la japana ŝu-speco. Brian respondis, ke li ricevis la vorton buŝe de mi dum vizito al Aŭstralio...


Kaj antaŭ nelonge mi malfermis la *Hejman Vortaron* de Jouko Lindstedt. Kaj kion mi vidis? *Zorio*. Kaj la difino estas ekzakta. Nu, kie Jouko trovis tiun vorton? Ĉu mi prave suspektas, ke li rikoltis ĝin en la vortaro de Harry kaj Fox?

NI REMEMORAS PRI...

17-A INTERNACIA INFANA KONGRESETO, Lucerno, 1979



Tiu-ĉi foto estas el la arĥivo de la CO de UEA. Ĉarmaj infanoj! Kiaj ili estas nun? Kion ili faras? Kie vivas? Ĉu ili ne forgesis Esperanton kaj la semajnon en Lucerno...? Mi petas ilin /kaj ankaŭ la surfotajn gvidantojn/ sendi al la redaktanto sian aktualan foton /kiun mi poste resendos/ kaj kelkfrazan rakonton pri si. Atenton – ne forgesu indiki la numeron, sub kiu ni trovas vin sur la foto.



PENSOJ DE UZBEKA FILOZOFO HAMID ZUMIN,

VERKITAJ ORIGINE EN ESPERANTO

/EL: Kancerkliniko, jan. febr.mar. 2002/

Politiko

Ju pli da grujero, des pli da truoj. Sed ju pli da truoj, des malpli da grujero.

Moralo

Egoisto estas tiu, kiu pensas pri si anstataŭ pensi pri mi.



DIVERSAĴOJ

Tipografitaj fabelkajeroj

La retejo "www.omnibus.se" temas pri la tiparoj de Marko Luin kaj direktas sin al fakuloj interesitaj pri tio. Ĝi estas trilingva: sveda, Esperanta, angla - en ĉiuj detaloj.

Por montri la tiparojn en uzo, la desegninto lastatempe eldonis elŝuteblajn kajeretojn en kiuj tiuj tiparoj estas uzataj. Por la sveda kaj angla li uzis popolfabelojn de tiuj popoloj. Tion la Esperanto-popolo ne havas, tial li utiligas tradukojn.

Franko Luin petas pri proponoj de pliaj popolfabeloj el diversaj lingvoj kaj mondopartoj. Skribu al [franko@omnibus](mailto:franko@omnibus.se), se vi povas helpi.

El: ret-info

Eŭroskola en Esperanto

Finna, franca, hungara kaj kroata grupoj atingis la urbon Strasbourg la 17-an de marto.

Interkona vespero kun kantoj okazis la unuan vesperon. Dua tago estis dediĉita al la serioza preparo por la 'parlamentaj' elpaŝo, okazinta en la sekva tago. Esperantistoj denove kunsidis kaj diskutis en la EU-parlamentaj benkoj.

Inter 400 lernantoj el EU-landoj troviĝis 35-kapa E-delegacio kun pluraj ne EU-landanoj.

Kelkaj esperantistoj elpaŝis publike en la plenkunsido kaj en la laborgrupoj. 'Eurogame' ludis teamoj kun la reprezentantoj el ĉiuj landoj. Gajnis tiu kun du esperantistinoj - francino Fanny Allousque kaj kroatino Ana Anic.

El: ret-info

Familia Renkontiĝo

Eckhard Bick kaj Kim J. Henriksen iniciatis privatan somerferian semajnon kun 15 infanoj kaj 15 plenkreskuloj. Ĝi ne rekte estis Esperanta aranĝo, sed nur 2 el la plenkreskuloj ne parolis la lingvon. La semajno estas inspirita de la aranĝoj en la sudo kiel PSI kaj REF.

El: Esperanto en Danio, marto 2002

Bona Espero salutas

La konstanta verda familio en Bona Espero /Brazilo/ havas nun 36 infanojn. Sur la foto, farita de juna germana volontulo Tobias Spelz, videblas unu kuirista duopo kaj Tobias mem dum liber-aera Esperanto-instruado.

Giuseppe Grattapaglia



PASPORTA SERVO DE RONDO FAMILIA

Annebaerbel kaj Pierluigi SIMARI,

kiuj aperis en la lasta FAMILIA ESPERANTO /n-ro 05/ en la rubriko
KORESPONDI DEZIRAS, ŝatus substreki sian emon gastigi esperantistojn.
Jen do la indikoj pri ilia kontaktelebo kaj gastig-kondiĉoj.



Bahnhofstrasse / Via Stazione 34
IT-39040 Salurn/Salorno /BZ/
Italio - Sudtirolo

Tel. en Italio: 338-6066682
Tel. el eksterlando: +39 3336234146
E-poŝto: annebaerbel@email.it

Nombro da gastoj kaj tagoj laŭ interkonsento.

Nur nefumantoj. Kunportu dormosakojn.

Aparte bonvenaj estas gastoj, kiuj muzikumas /kunportu vian muzikilon/.

Kun ni vivas du hundoj: Erno /ĉaŭ-ĉaŭ/ kaj Mina /grandega ŝnaŭcer/.

NI PREPARIGAS AL...

La **TRIA E-EKSPOZICIO POR INFANOJ** okazos en Nankino la **1-an de junio 2002**, ĝuste la daton de la Internacia Infana Tago. La organizantoj elkore esperas ricevi gratulajn leterojn, poŝtkartojn, fotojn kaj aliajn esperantajn el la tuta mondo. La kontaktadreso: Zhuang Rui

402/14 Jiao Fu Yin,
Fuzimiao, Nanjing
CN-210001 Jiangsu

rete: zhuangespero@163.com

La **24-a RENKONTĜO DE ESPERANTISTAJ FAMILIOJ /REF/** okazos en **Sikonda, Hungario**, inter la **12-a kaj 21-a de aŭgusto 2002**.

La loko estas malgranda ripoz- kaj kuracvilaĝo 20 km norde de Pécs, en belega montara regiono kun lageto.

Oni atendas proksimume 15-20 familiojn. Eblas partopreni ankaŭ partatempe kaj ekzistas ebleco plilongigi la ferion proprakoste en la sama loko.

Loĝado estos en 2-6-litaj lignaj domoj. Kelkaj domoj havas banĉambbron kaj kuirejon. La manĝado okazos en granda komuna halo.

La programon oni ŝatus organizi tradicie: post la matenmanĝo komuna kantado, poste apartaj programoj kun la infanoj /kaj gepatroj/ laŭ aĝgrupo: desegnado, diversaj manlaboroj, fabellegado, konkursoj, sportaj ludoj ktp. Por la posttagmezoj oni planas ekskursojn al Pécs, al stalaktita groto Abaliget, al plaĝo, promenadojn ks.

La organizantoj: familio Slezák

Damjanich u. 2

HU-9200 Mosonmagyaróvár

Tel. : +36 (96) 211 271

Fakso: +36 (96) 579 430

Poŝtelefono: +36 (30)9372 490

La **25-a SOMERA ESPERANTO FAMILIA / FERIA TENDARO /SEFT/** okazos inter la **19-a kaj 28-a de julio 2002** en tendejo **Campingplatz am Dreetzsee, Thomsdorf**, regiono de urbeto Feldberg, Meklenburgo / Antaŭpomerio.

Kondiĉoj: memprizorgo /tendo, manĝoj, tendeja programo/, surloke oni povas lui kabanojn; kontaktu skribe aŭ telefone la tendejan oficejon.

Programo: migrado, ekskursoj, kafoklaĉoj kaj vesperaj kunvenoj, prelegoj, ĉiuvesperaj fabelhoroj, banado en lagoj.

Aliĝi kaj mendi kabanojn eblas ĉe: Campingplatz "Am Dreetzsee"

17268 Thomsdorf

telefono: +49 (0)39 889/746

fakso: +49 (0) 39 889/4745

Organizas: Esperanto-Klub Neubrandenburg

Werner Pfennig

Uns Husung 29/1104

DE-17034 Neubrandenburg

telefono: +49 (0)39 5 422 13 98

rete: werner.pfennig@veb.de

NE NUR POR INFANOJ

EN MIA ĜARDENO FLORAS MULTAJ FLOROJ

BEZONATA MATERIALO - aro da floroj /eventuale memfaritaj/

ENHAVO - la ludantoj sidas en rondo, ĉiu tenas bukedon da proksimume 10 floroj en la mano. La ludgvidanto komencas: "En mia ĝardeno floras multaj floroj: rozoj, tulipoj, potoj...". Kiam la gvidanto mencias nomon de floro, ĉiuj ludantoj levas sian bukedojn. Kiu faras eraron /kiu do ekzemple levas sian bukedon ĉe "poto"/, devas doni unu floran al la gvidanto. Gajnas tiu, kiu fine havas la plej multajn florojn.

VARIANTO - laŭ lingva nivelo aliaj kategorioj de objektoj/bestoj, plantoj, koloroj, substantivoj, .../, anstataŭ floroj alumetoj, slipoj, aŭ io alia.

ARANEA RETO

BEZONATA MATERIALO - facile disolvebla fadenbulo

ENHAVO - la ludantoj sidas en cirklo. La gvidanto ĵetas la fadenbulon al iu ludanto kaj diras kunmetitan substantivon, ekz. "dommuro". La komencon de la fadeno li retenas en la mano. La alia ludanto volvas la fadenon unufoje ĉirkaŭ sian fingron, ĵetas la bulon al iu kontraŭe sidanta kunludanto kaj diras ekz. "murgazeto". Tiu same daŭrigas dirante eble "gazetpapero". La sekvantoj daŭrigas per vortoj kiel "paperfabriko", "fabrikĉefo", "ĉefetaĝo" ktp. Tiel iom post iom estiĝas aranea reto, kiun post kelka ludtempo oni povas sammaniere redisolvi.

Ĉerpita el: LINGVAJ LUDOJ DE GEJ

Kompilis: ELISABETH KUHL

HUMURO

Tra la strato iras du puloj.

Unu el ili plendas:

Mi estas tre laca. Ni plu iru,
ni prenu hundon.

Filineto, ĉu vi jam lavis la telerojn?-
demandas la patrino.

Jes, panjo, nun mi jam balaas
la rompitaĵojn.

Ĉu mi povas esti punita pro io,
kion mi ne faris, patro?

Certe ne, mia infano.

Tre bone; mi ne faris mian
hejmtaskon por la lernejo.


Vi virinoj eltenas dolorojn
pli heroe ol la viroj.

Kiu rakontis tion al vi?

Ĉu kuracisto?

Ne, ...suisito.

Mi daŭre kuiradas kaj bakadas
por vi kaj kion mi ricevas? Nenion!
Vi estas feliĉa...! Mi ricevas
stomak-doloron.



SOLVOJ de la krucenigmo el FAMILIA ESPERANTO 3/2001:

HORIZONTALE: 1 - spegul, 3 - libr, 6 - boben, 7 - tas, 9 - saluj,
10 - mat, 11 - najl, 12 - glas, 13 - broĉ; VERTIKALE: 1 - seĝ,
2 - leter, 3 - lavmaŝin, 4 - bankuv, 5 - pentraĵ, 6 - bovl, 7 - subtas

POŝTKARTA INVITO



Kontaktu: d-rino Anĝelina Taremi
P.O.Box 9342
Scottsdale, AZ, 85252-9342 Usono

Telefono, fakso: (602) 426 8131
Retadreso: angelina_t@msn.com
Hejmpaĝo: <http://verdadomo.tripod.com>

ENHAVO

2. Editora angulo
- 2.-3. La tri generacioj de la Esperanto-socio (A.Wandel)
4. Lingva angulo
5. Desegnata poemo (E.Mirska)
6. Librobreto
7. 18-a IF (L.Gabalda)
8. Kiel paroli Esperanton kun sia trijara filino (P.Fiŝo)
9. Desegnis al ni (K.Ertl)
10. Ĉu tiel naskiĝas vortoj? (T.Steele)
11. Ni rememoras pri la 17-a IIK
12. Diversaĵoj
13. Pasporta Servo de RF
Ni prepariĝas al...
14. Ne nur por infanoj
15. Poŝtkarta invito


FOTOJ

Titolpaĝe:


- supre: En Bona Espero eĉ la kato ŝatas balanci (fotis Tobias Spelz);
- malsupre: Trinkante en la "Knajpo" dum la 18a IF (foto de gesinjoroj Gabalda);

Dorspaĝe: de supre, maldekstre:

- Kontentega HDP;
- Ni ĝuas la silvestran bankedon;
- Hokus pokus filibus, trifoje nigra kato;
- Paŭla adiaŭas;
- Danckurso;
- Koncerto de Elena Puĥova.
(Fotis ges-roj Gabalda)



Ĉia ricevinto de FAMILIA ESPERANTO povas libervole kontribui al UEA-konto de RF: idoj - p



REDAKTAS: Katarina Bodnárová, Hlavná 63, SK-07631 Streda nad Bodrogom

